



La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 20.

Melburno (*Melbourne*), Austra'io.

10 Februaro, 1922.

Esperanto in a Victorian School:

A Teacher's Letter.

Miss Margaret Wells, head teacher at Gooram, writes in the "Victorian Education Gazette and Teachers' Aid":—"I was very pleased to read the article on 'Esperanto in the School,' which appeared in last month's number. It dealt with the experiment of Esperanto in schools of other lands. I am writing to report a similar experiment which is being carried out in a little bush school in our own land.

"Having proved the value of Esperanto as a means of international communication, and realizing that the language is a stepping-stone to other languages, I have decided to give it my earnest support. Consequently, when I was transferred to this little country school, I did not waste any time in arousing the interest of my new pupils. At the close of the first day, I brought them to attention, explained Esperanto and its advantages, and then asked for a show of hands of those who were willing to be in their places fifteen minutes before school-time, in order to study the language. Every hand shot up. Each morning since then, the children have been in their places

eager for the lesson. Even the tiny tots in Grades I. and II, listen attentively, and pick up words here and there. There is no doubt about their enthusiasm.

"The usual English greetings between teacher and children, and mate and mate, have been dispensed with. Esperanto has taken such a hold on the children that they make use of it whenever possible. Already they are looking forward to the time when they shall be able to correspond with children in other lands. At the rate some of the seniors are progressing, this should be possible at the end of three months' tuition.

"Should Esperanto become a subject in the State School curriculum, as all Esperantists sincerely hope, then I shall have the pleasure of knowing that I was one of the pioneers of the language in this Department, and that it was in a little bush school that some of the first seeds were sown.

"If, in later years, any of my present pupils have need to study a foreign language, they will find Esperanto a valuable asset.

"In conclusion, I may state that I look upon this simple language as one of my chief aids in winning the hearty co-operation of the whole school."

Nia Propagandisto en Eŭropo.

S-ro Percy T. B. Hudson, la ĉefo de la oficialaj reprezentoj de la Aŭstralazia Esperanto Asocio al la Praha Kongreso, ankoraŭ vagadis tra Eŭropo. Ĝis nun li vizitis dek landojn kaj ĉie havis bonajn rilatojn kun Esperantistoj, kiuj gvidis, kaj en multaj aliaj manieroj tre helpis lin, kaj faciligis lian iradon.

S-ro Hudson nun estas en Grekujo kaj laŭ sia nuna arango restos en Eŭropo ĝis la venonta kongreso en Helsinki. Sursipe vojaĝante el Hispanujo Grekujo li skribis leteron pri siaj faradoj en Hispanujo.

— Mi skribis laste el Barcelono skribis s-ro Hudson. — Ĉe Barcelono mi renkontis multajn Esperantistojn, kaj vizitis kelkajn grupojn. Laŭ peto mi vizitis la grupojn ĉe Sabadell kaj Taraso. Ambaŭ urboj estas proksime al Barcelono. La grupoj feste ricevis min kaj elmontris al mi siajn urbojn. Ĉe ĉiu grupo la anaro estas pli ol 200. En Kataluno Esperanto bonege progresas.

Lasinte Barcelonon mi iris al Valencio. Tie ankaŭ la Esperantistoj bone helpis kaj gvidis min. S-ro Ventura volis, ke mi akompanu lin al la Universitato renkonti tie Profesoron Carlos y Garcia, kiu estis Esperantema, sed opiniis, ke la lingvo ne taŭgos kiel interkomprenigilo ĉe diversnaciaj homoj. Li estas profesoro de la angla lingvo tial mi rakontis al li miajn spertojn pri la lingvo en Japanujo, kaj ankaŭ en la dek landoj en Eŭropo, kiujn mi jam vizitis. S-ro Ventura, kiu bone parolas, kaj mi interparolis esperante, dum la profesoro atente aŭskultis dum, eble, kvarono da horo. Fine la profesoro diris al mi, ke li estas tute konvinkita, ke la lingvo tute taŭgos, kaj miris ke ni tiel flue povas paroli artefaritan lingvon. Li promesis min, ke li tuj permesos s-ro-n Ventura komenci kurson ĉe la Universitato. Poste mi iris al Madrido, kiu estas tre bela urbo. Mi restis tie ok tagojn, tiam iris al Kordovo, Granado, Sevilo kaj Lisbono. Ĉe Lisbono la delegito (de U.E.A.) venis al la hotelo trovi min kaj afable gvidis min, kaj la duan

tagon ni vizitis la Polican grupon. La registaro permesas ke ili por la vorton — Esperanto — kaj stelos sur la maniko da la jakoj. Mi vizitis la policestron kaj gratulis lin, ke Lisbonaj policoj povas paroli esperante kaj helpi la vizitantojn. Unu policano tradukis por mi. La poliestro respondis, ke li estis fiera, ke la policanoj povis helpi fremdlandanojn. Mi vizitis la kvar tagojn ĵurnalojn kaj diris al la redaktoroj, ke mi volis danki la Esperantistojn policanojn por la helpo, kiun mi ricevis el ili per Esperanto. La sekretario informis, ke ĉiu ĵurnalo presigas informon pri mia vizito. . . .

El Lisbono mi iris vaporsipe al Marseljo. La delegito venis al la hotelo kaj vespere vizitis la Laboristan Grupon. Kelkaj anoj bone parolas Esperanton. Estas aliaj grupoj, sed mi ne havis tempon viziti ilin, ĉar mi devis trafi la ŝipon ekironte al Grekujo.

Gubernatoro Servas Esperanton

La ŝtata gubernatoro de Kvinslando (sir Matthew Nathan) sendis havigis al Esperanto iom da reklamo, kiam, ĉe la 34-a ĉiujara kongreso de la Unuiĝo de Kvinslandaj Instruistoj, li atakis la proponojn favorantan instruadon de Esperanto. Inter kelkaj diroj, kiuj montris, ke li scias nek Esperanton nek Esperantismon, la gubernatoro konstatis, ke homo lerninte Esperanton ne estas akirinta veran lingvon tiel same kiel homo lerninte alhemion aŭ heraldikon, ĉe estas akirinta veran scienccon.

Tio nature instigis kelkajn Esperantistojn klopodi montri per leteroj kaj ĵurnaloj la erarojn de lia moŝto la Kvinslanda gubernatoro. Unu skribis pri siaj spertoj en Eŭropo, kie li trovis Esperanton vere viva lingvo esprimanta la spiriton de 37 diversnaciaj lingvoj ĉe la 13-a kongreso.

Alia batalanto por nia afero preĝis en Melburnan ĵurnalon kopio de telegramo sendita al la Kvinslandaj ĵurnalaro protestanta kontraŭ la nesacia parolado de la gubernatoro. Tia petanta ke la publiko akceptu la opinion de tiaj eminentuloj kiel profesoro Gilbert Murray, Oxford, kaj 21 sciencistoj kaj membroj de la

Franca Akademio anstataŭ tio de la gubernatoro de Kvinslando.

Ankoraŭ alia sinjoro skribis lerte en la ĉiutaga presaĵo kontraŭ la eraroj de sir Matthew Nathan, citante pli bonajn aŭtoritatojn ol la Kvinslanda gubernatoro por pruvi la valoron de Esperanto.

Laste venis kun sia plumo "Oriel," la "Argus-a" burleskisto pri kurantaj plej interesaj aferoj, dirante (inter aliaj amuzaj kritikoj) per vortoj moke kaj komike kunmetita el pecoj de diversaj lingvoj kaj slangaĵoj, ke sir Matthew Nathan parolis "tra sia ĉapelo." "La Suda Kruc" konsentas kun "Oriel!" Certe, "Oriel" mokis nian aferon, sed por fari tion li plenigis grandan proporcion de sia multelegata kolono; kaj Esperantistoj ja povas akcepti lian verketon kiel reklaman servon al "nia kara."

A Humorist's "Esperanto."

Esperantists are indignant at the assertion by the Governor of Queensland (Sir Matthew Nathan) that Esperanto is no more a true language than alchemy or heraldry is a true science, and that a language is useless if it does not express the spirit of the people who use it. A reply in Esperanto has been prepared, which we give herewith. At an enormous expense an expert has been engaged to supply explanatory notes where these seemed necessary.

Monseignori Matthewski Nathanissima est (is) loquatens (talking) thuis chapeauski (hat) wen illa (he) assertos that Esperanto est neau mora fidelia (real) dialectico (language) than alchemico vel (or) heraldria est a fidelia scientitia. Ille (it) est similaria (like) is damcheek (imprudence or ill-advised utterance) to loquate sutch a thing. Ille est absoluta tomirotto to suggesta that Esperanto duzzant expressa de esprito (spirit) ov da peepl hoo yusit. Esperanto habes (has) numerata (many) lexicomicuts (words) to expressa sutch a esprito—wiski, brandi, rum, jin—aul goodeau, credo (believe) muh! Asfer utilifaco (usefulness), wuncan cursato (use strong language to) da jonnop (constable) en Esperanto sanso (without) currenta (running) da riska ov

coppin' (incurring) septemissimo (seven) diurnas (days) sanso da option from da bique (magistrate). Nostra (our) consilias (advice) to Matt (Esperantist abbreviation for Governor of Queensland) est to gettized, scissorata (cut oui) da rufstuf, aussi (and) estudia (learn) Cymbrias (Welsh) from Billiyooz (a Cambrian chieftan, who flourished some hundreds of years after Owen Glendower).

("Oriel," in "The Argus," Melbourne).

Tie Ci... kaj Tie.

Milde la vento karesas la palmojn; fore sur rifo muĝadas la maro; siblas ondetoj sur sabla la bordo, kaj naĝas nubmontoj en bluo kaj klaro.

Revanta laguno bluverde kolora; flava bord' sennakula kaj glata; densaj arbustoj kaj longaj palm-trunkoj; milpintaj palmsuproj — ho, tero benata!

La longa strato vibras;

mil radoj knare bruas.

Batado kaj rebato

de mil piedoj fluas.

Per grincio de elektro,

per siblo de vapo,

per krioj kaj per skuoj ...

jen sonas urba horo.

Malvigla paŝado de mildaj brunuloj; arbara kvieto, kaj blua marfono; akvaro senfunda, kolor' milnuanca; horizonto senlima — Edena terzono! Inside la nokto jam levas flugilon; la lumo forglitas kun sango kaj oro; tra l' nigro trapikas lumpintoj densare ...

velura vespero, trankvilo kaj gloro!

Pli surda jam batado;

pli densa la homfluo;

pli ofta kaj pli akra

la krio kaj la skuo.

La tag' apenaŭ velkas,

pli hela lum' jam flamas;

gajecon kaj suferon,

maldolcon kaj esperon,

sinceron kaj malveron

lanternoj mil proklamas.

Kvieto venas fine;

silentas lastaj batoj;

lanternoj lumas ĉiam

sur domoj kaj sur stratoj.

A. Delsudo.

Sumasuma,

Ninigo-Insularo.

Peko kaj Eraro—Ecoj de Homaro.

I venture to point out a few everyday errors in our pronunciation and use of words. It will, I hope, help spertuloj to correct themselves, and beginners to avoid the need of correction. Criticism, even in Esperantujo, is not without risk, but then . . . "seas betwixt us braid do roar." Courage!

Esperanto words are rich in vowels, the round, melodious vowels of Spanish and Italian. Pronounce them roundly and melodiously, and, above all, don't swallow 'em! Give each vowel his generous due. No vowels, no beauty. Esperanto can sound beautiful, or it can, if you act the cannibal with the vowels, sound hideous. Now, cannibalism is fast dying out, even in the South Seas, and it ought to be quite extinct in Esperantujo.

Don't say "ven's" for "venas" or "venis" or "venos" or whatever you are trying to convey. Say "venas" or "venis" or "venos."

Don't say "la tut'n" for "la tuton." Likewise, "Tio estas la tut'n" should be (but often isn't) "Tio estas la tuto."

Not "Kion okaz's?" but "Kio okazis?" Not "balon okaz's vespere," but "balo okazis vespere." (Why the superfluous n's, Heaven only knows).

Away with that interloping r in "lalaria," "miarelektio," "bonaramiko"! It's as bad as saying "droring-room" or "Australia-alone," or "daughter-in-lawrelect," as a Gilbert and Sullivan chorus lately did, and was very properly censured for the same.

Let your e be e and not ej. "Rivero"—"ree-vair-ro" (and not "ree-vay-ro"). "Sendi"—"sen-dee" (and not "sayn-dee"). Listen to the vowels of your Spanish or Italian or Polish friends.

"Abud" is accented on the a: "ah-wood" (not apood!) To decide in Esperanto is "decidi" (not "decedi"). "Plezuro" is "plez-oor-ro." without a single one of the misguided variations that one sometimes hears.

Be merciful, and spare that a at the end of the adjectives. Too often it is hanged, drawn and quartered,

and an err-ing, if innocent, snuck put in its place. "Bona"—"bo-na" and not "boner" (ostisto?!). "Sopulo"—"soo-pah," and not Gerald Souper. "Fama"—"fah-mah," and not "fah-mah," and "gia"—"lee-ah" and "jee-ah" without a leer or a jeer. "Homa"—"ho-mah," and never wrote the line not a line of it.

That same erring, hurting, snoring sound "err" is never found in Esperanto, though Esperantists, poor weak humans, do err something. "Perdi"—"pairr-dee." "pairr," with ne'er a sound of pussy. "Murdi"—"moor-dee." "Kirli"—"keerr-lee," is straight, not curly. "Serco"—"shairrt-so," has no relation to a masculine garment, nor to "sighted" people who do not see the value of Esperanto. (Our talented contributor here alludes to the fact that an occasional misprint intrudes even into the "Suda Kruco."—Red.)

Sister Susie "trikis" socks for soldiers; but our daily bread is made from "tritiko" (Latin triticum, wheat).

Your Esperanto society has a "sekretario" (and not a sekretario). Those words ending in -io, -ia, and so on, all have the accent on the second-last vowel (like all Esperanto words), in this case the i.

When your poet or your favourite prose writer has elided a vowel, as written "de l' patro," don't go and pronounce that vowel in reading. If it is dropped in writing, it is meant to be dropped in speaking also. "De l' patro"—"dell pah-tro." "Espero"—"less-pairr-o." "Amo"—"ahm kye vee-yo."

"Mejlo"—"may-lo" (not my-lo). "Hejmo"—"hay-mo" (not high-mo). The treasurer of your Esperanto society is a "kasisto," not a "kaŝisto." The latter word means a "hider" and seems to suggest absconding with thousands of pounds, and years of imprisonment and other things which have nothing to do with Esperanto societies.

And lastly, O dear delinquent reader, please do not call the "Suda Kruco" the "Suda Kruço," for "kruço" means "jug."

A. Delsudo.

Recenzo.

Mondo kaj Koro: poemoj de K. de Kalocsay. Paulo Balkanyi, Budapest. VI., Hadjos u. 15; sv. fr. 26; sil -/4 aŭ 2 ekzempl. por 3 resp. k.

Aperis en Hungarujo nova poeto kiun liaj entuziasmaj amikoj salutas kiel duan Grabowski, kaj certe liaj poemoj eldonitaj en "Mondo kaj Koro" estas de alta grado. La unua parto de la libreto, "Nova Sento" pritraktas la venon de Esperanto, kaj Esperantismo sed ne ĉi tie oni trovas la plej belajn poemojn, ĉar la temo aperas en ordinaraĵoj, iom tro pezaj por poezio. Vera, gracia poezio kontraŭe troviĝas ĉe la dua parto, "Mondo kaj Koro," kie oni povas vidi la filozofion de la poeto. Por li

"estas mond' kaj restas mond'
Malĝoja kaj malbona."

Tial doloro, malgajeco kaj mal-kontento premeblas lin; eĉ amo ne povas malpezigi la homan sorton, ĉar doloro sin trudas tien, forpelante ĝojon. Fine la poeto komparas sin kaj vivon kun infano enuigita de ludilo

"Li jetus for, kaj tamen, se ĝin oni
Forpreni volas,

Li ploras veas kaj ne volas doni."

Tia vidpunkto certe ne disigas lin de ĉiu gajeco; li povas ŝati la donojn de Naturo (en "Printempo," "Somero," "Autuno") la senzorgecon de junuloj (iras abiturient); kaj li kantas ilin per ĉarma ritmo. Malgraŭ versoj tiaj, kiaj "Malam', malpas', barakt', kaj lac'," la poemoj estas harmoniaj kaj graciaj; es- pereble multaj aliaj venos baldaŭ de la sama poeto.

Bonhumoraj Rakontoj de nuntempaj hungaraj verkistoj. Paulo Balkanyi, Budapest, VI., Hadjos, u. 15. sv. fr. 30; 4 pencoj.

Feliĉe la dono de humoro estas tute universala, kaj tio, kio amuzas Hungaron, komprenate de Anglo aŭ Franco amuzas lin ankaŭ; per Esperanto tia rezultato estas atingebla kaj je ĉi tiu libro atingita. La rakontoj estas de diversaj aŭtoroj, nerilataj inter ili, kaj tradukitaj de diversaj personoj en bonstilan Esperanton. Tiu, kiu havas iom da libertempo kaj volas legiĝi malseriozan

aŭ amuzantan bone farus legante "Bonhumoraj Rakontoj," precipe ĉar tiu samtempe ekvidus nuntempan hungaran literaturon.

Gvidlibreto de Antverpeno.—Dek naŭ paĝaj fotografaĵoj de la vidi-ndaĵoj de Antverpeno, la sidejo de la VIII-a Kongreso internacia (1911) bele ilustras 32-paĝan broŝuron pri la urbo. Por ricevi ekzempleron sendu nur internacian respondpoŝtkarton al S-ro F. Schoofs, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen (Belgujo).

Gvidlibro de Ĝerona, eldonita de "Ĝerona Espero," estas bone presita, kaj enhavas dekok paĝojn de informo pri Ĝerona, la urbo kie okazis la IX-a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio, 1921. Diversaj sekcioj ilustritaj de bonaj fotografaĵoj pritraktas historiajn sciigojn, monumentojn, konstruaĵojn da la urbo.

Anekdotalo.—Profesoro J. Susser, Tradukaĵoj el la germana kaj ĉeĥa lingvoj; bonega legaĵo por komencantoj kaj progresintoj. Prezo Kĉ 5 — (M. 5.) Eldonejo: J. Kern, librovendejo Saaz.

Espero Katolika, en Udenhout (Nederlando). Tiu ĉi ekzemplero informas nin ke Espero Katolika reaperos, kun eklezia aprobo, kiel montaga gazeto.

Hejme— Post Praha.

La 20an de januaro, en la Austral Salon, Melburnaj Esperantistoj estis gastoj de la nove formita Melburna Esperanto Klubo, kiu kunvenis por festi la revenon el Eŭropo de s-roj J. G. Pyke kaj R. Rawson. Por ĉiuj ĉeestantoj en la plenigita ĉambrego la okazaĵo estis ŝarĝita de intereso. La sinjoroj estis longe konitaj kiel fervoraj Esperantistoj; kaj tiuj, kiuj ne havis okazon provi Esperanton en fremdaj landoj, kaj eĉ tiuj, kiuj tie vojaĝis en pli pacaĵ tagoj ol la nunaj, avide atendis la paroladojn de la ĵusaj revenintoj, por eltrovi ĉu ili spertis plenan sukceson de la lingvo en nuna, disrompita Eŭropo. Interese, entuziasme, tute kontente pri Esperanto parolis ambaŭ sinjoroj, konfirmitaj de ilia vojaĝo en la kredo pri Esperanto kiel vera 'mond-movigilo.

Kroniko.

Campsie, N.S.K.—Trafa artikolo de L. Fosto aperis lastatempe en la ĵurnalo "Alert."

Melburno, V.—S-ro R. Jones parolis al filo de Aŭstraliaj Indigenoj Asocio, (Australian Natives' Association), ĉe Fitzroy la 31an de Januaro. Li montris kiel nesagaj estis la diroj de la ŝtata gubernatoro de Kvinslando per kiu ĉi tiu mallaudis Esperanton.

La 4 an de februaro, en Hooker's Cafe, S-ro Rawson parolis pri siaj spertoj inter Esperantistoj ĉe kunveno por la publiko.

La sekvantan vesperon, ĉe alia por la publiko kunveno en Socialist Hall, s-roj Pyke kaj Rawson alparolis kelkcent homojn pri sia per Esperanto vojaĝo, kaj montris treege interesajn lumbildojn de diversnaciaj grupoj de Esperantistoj kaj lokoj vizititaj de la parolantoj. Espereble, s-roj Pyke kaj Rawson ofte montris tiujn intersajn lumbildojn.

Sidnejo, N.S.K.—La jara raporto montras ke la rezolucio de la Aŭstralia Laborista Unuiĝo favoranta Esperanton gajnis multon da publikigado por nia movado. Dum la jaro ĉiumonataj prelegoj kaj koncertoj okazis en la Edukada domo. Ĉi tiuj prelegoj estos daŭrigotaj, sed malpli ofte. Kurso estis fondita ĉe kunveno de la Edukada Asocio de Laboristoj, (Workers' Educational Association). Artikoloj aperis en dek ses ĵurnaloj kaj tricent leteroj estis skribitaj. La raporto dankas la membrojn kaj kunhelpantojn kaj forte alvokas la membrojn al konstanta, persista propagando. La nunaj oficistoj estas, Prezidanto, s-ro J. Joliffe; Vic-Prezidantoj, f-ino Ethel Lee kaj s-ro Leiber; Sekretario, s-ro L. Fosto; Kasisto, s-ro F. V. Taylor.

Gisborne, N.Z.—La ĉi tiuj grupanoj vige studadas.

Rabaul, Nov-Gineo.—Dua kurso konsistanta el Eŭropanoj, estas komencita. Kelkaj el la lernantoj faras tre kontentigan progreson. Manko de lernolibroj iom malhelpas.

Generalo Sebert.

La nomo de Hyppolite Sebert estas bone konata de multaj da Esperantistoj, kaj meritas esti konata de ĉiu, kiu interesiĝas pri nia lingvo.

La generalo ĉi tiun jaron festis sian 25-jaran akademian datrevenon. Li naskiĝis la 30an de januaro 1837 kaj post siaj studoj fariĝis oficiro de la mara artilerio. Li okupigis post balistikoj kaj fariĝis unu el la plej kleraj balistikistoj de la mondo, kies nomo estas konata de ĉiulanda artileriistoj.

En 1898 li fariĝis Esperantisto. De tiu tempo li ŝparis nek tempon nek monon nek sian grandan aŭtoritatecon en la sciencaj medioj por la esperanta laboro. La generalo estas prezidanto de la Konstanta Komitato por Kongresoj kaj de la centra Oficejo. En la lastaj sukcesoj de nia lingvo liaj agado kaj aŭtoritato ludis rolon, kies grandecon multaj samideanoj ne supozas.

Nun 83 jara, la generalo laboras kun energio, kiun multaj junulo povus imiti. Ni, Aŭstralazianoj, gratulas la eminentan akademianon kaj dankas lin por lia netaksebla helpo kaj subteno.

Aŭstraliano en Hispanujo.

Okaze de lia ĉeesto al la ĝenerala Kataluna Esperantista Kongreso, li varme invitita de la komitatoj de Esperanta Grupo-Aplech, la 14 Oktobro vizitis la Sabadell-a gesamdeanoj Percy T. B. Hudson, kiu post lia ĉeesto al la Praha kongreso, dediĉas viziti la Eŭropajn gesamdeajn, ĝis la XIV en Helsinki. La du tagoj kiujn li restis inter ni kaŭzveran impreson al nia gesocietano. Ni tute deziras, ke lia Eŭropa travojaĝo estu al li feliĉplena. (El La Semisto).

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

La Kvara Kongreso.

Pro diversaj kaŭzoj la projektita Kongreso en Hobarto estas prokrastita ĝis nefiksita dato. Pasko, ĉi tiu jaro, venos malfrue, kaj la semideanoj el la nordo timas, ke la vatero tiutempe estos tro malvarma por esti ĝuebla. Plue, baldaŭ okazos parlamenta balotado en Nova Sud-Kimrujo, kaj famo diras, ke sinjoro O'Donoghue, nia prezidanto, estos kandidato. Pro tio li ne povas ĉeesti kongreson nek doni ian tempon al preparaj aferoj ĝis post la balotado. Ekzistas aliaj malhelpoj sed ĉu estas necese citi ilin? Kongreso sen nia prezidanto estas neebla.

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, n-roj 1, 2; Arguso, n-ro 3-4; Bulgara Esperantisto, n-ro 2; Bizantio, n-roj 3, 4; Ĉeĥoslovaka Gazeto, n-ro 5; Nova Tempo, n-roj 5, 6; Esperanto Finnlanda, n-ro 10; Esperantista Ĵurnalo, n-ro 5; Esperanto Triumfonta, n-ro 52; Eklezia Revuo, n-ro 13-14; Hungara Esperantisto, n-roj 11, 12; Internacia Pedagogia Revuo, Boom-sche, Steenweg, 444 Antverpeno, antisto n-roj 11, 12; Kristana Esperantista, n-roj 11, 12; Kristana Espero, n-ro 4-5; Katolika Mondo, n-ro 3; Libero, 12; Literaturo, 12; L'Esperanto, 10, 11; La Provo, Provorgano de Zagrebaĵ Esperanto Instruistoj, Jugoslavio, Monata, n-ro 3; La Monde Esperantiste, n-ro 5; Nova Tempo, n-ro 20-21; Progreso, n-roj 9, 10; Revuo Orienta, n-roj 10, 11, 12; Sennacieca Revuo, n-ro 3; La Semisto, Sabadell, n-ro 26; Verda Utopio, n-roj 11, 12; Verda Ombro, n-ro 10.

Laudo al la Hundo.

Eble estas, ke la plej bona amiko, kiun homo havas, sin turnos kontraŭ li kaj fariĝos lia malamiko. Povas esti, ke la gefiloj, kiujn li edukis kun amo kaj zorgo fariĝos sendankaj. Tiuj, kiuj estas la plej intimaj kaj karaj, tiuj, al kiuj ni konfidas nian feliĉon, kaj nian bonfamon povas esti perfiduloj al tiu konfiditaĵo. Homo povas perdi la monon, kiun li havas. Ĝi mankas al li kiam li plej forte ĝin bezonas. La reputacio de homo povas esti perdita en momento, pro senpripensa ago. Tiuj, kiuj sin humiligas por honoro nin, kiam al ni ĉio prosperas, eble estus la unuaj ĵeti sur nin la ŝtonon de malico, se malfeliĉo, kiel nubo, atingus nin. La sola, absolute neegoista amiko, kiun homo povas havi en ĉi tiu egoista mondo, kiu neniam forlasas lin, neniam fariĝas sendanka aŭ perfida, estas lia hundo.

La hundo de homo restas fidela al li en prospero kaj malriĉeco, en malsaneco kaj sano. Ĝi kuŝiĝas sur la malvarma tero, kiam blovas la vintraj ventoj, kaj kiam forte peiĝas la neĝo. Ĝi kisas la manon kiu ne povas doni nutraĵon. Ĝi lekas al si la ulcerojn, kaj vundojn ricevitaĵn en la batalo kontraŭ la kruela mondo. Ĝi gardas la dormon de la mizerula mastro kvazaŭ li estus princo.

Kiam ĉiuj aliaj amikoj forlasas lin, la hundo restas. Kiam riĉaĵoj forflugas kaj reputacio disfalas, en sia amo ĝi restas tiel konstanta, kiel la suno en sia vojaĝo trans la ĉielon.

Se la sorto forpelas la mastron en la mondon, elpelito, senamika kaj senhejma, la fidela hundo ne petas pli grandan privilegion, ol akompani lin, por gardi lin kontraŭ danĝero, kaj batali kontraŭ liaj malamikoj. Kaj kiam venos la lasta sceno, kaj la morto ĉirkaŭprenos ĝian mastron, kaj ties korpo estos forkuŝita en la

Jus aperis 3-a eldono de

BES-a ADRESARO DE ESPERANTISTOJ

el ĉiuj landoj.

Bela, praktika manlibreto, 90-paĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. Prezo 1ŝ. 6p., alilande 1.50 Fr. sv., pagebla en poŝtm. aŭ respondk.

Aliĝu tuj al 4-a eldono! Enskriba kotizo, 1/-, kun adresaro 1ŝ. 6p., kun propra portreto 3ŝ. 3p.

Anoncu en 4-a eldono! 1 pĝ. 7ŝ. 4p. (8 Fr. sv.), 1 linio. 1/-.

Eldonas "Bohema Esperanto-Servo," Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

Reprezentanto por Aŭstralio: A. R. COHEN, "The Hawthorns," Malvern Rd., East Malvern, Vic., peras vendon. aliĝojn kaj anoncojn.

malvarman teron, malgraŭ tio, ke ĉiuj aliaj amikoj iros sian vojon, tie, apud la tombo, troviĝos la nobla hundo, kun la kapo inter la piedoj, kaj la okuloj vikle nefermaj, fidela kaj lojala ĝis la morto. (El la angla de Senatoro George G. Vest, Missouri, Usono).

Dr. Sydney Whitaker.

Australian Esperantists will shortly welcome a valuable accession to their ranks. In a communication to an Australian friend, our samideano, Dr. Sydney Whitaker, the well-known medical officer of the S.S. "Glaucus," stated that he intends to come to Australia at an early date and reside here permanently.

Here and There.

The third congress of the Bulgarian Vegetarian Association decided to use Esperanto in its correspondence with other countries.

The Scottish Congress was held at Dunfermline in September. About 150 Esperantists attended, and there was much enthusiasm. The Mayor presided at a public meeting, and in the course of a long speech heartily supported the Esperanto movement. S-ro Page spoke of his experiences at the Prague Congress, and S-ino Watson, a member of the school board, said she would continue her efforts to have Esperanto introduced into the day schools. Rev. Baird and S-ro Page conducted a service on Sunday in one of the local churches.

At a meeting of the Japanese Railway Esperanto Association in Tokio on 17th September, speeches were made by the Minister for Finland, Dr. Ramstedt, and by railway and university officials. It was decided to "Endeavour to have English replaced by Esperanto on official posters and other advertising matter displayed on railway stations, to in-

terest all officials of the State railways in Esperanto, and to bring the matter under the notice of other transport systems." The meeting was a great success, and 180 railway employees commenced the study of Esperanto under the guidance of S-roj Ossaka and Fujiki.

At the Nagoja National College the Esperanto students number 356.

La Revuo Orienta gives particulars of the activities of 47 Japanese Esperanto groups. On an average two new members join the Japanese Esperanto Institute each day.

During 1921 Esperanto made great progress in Switzerland. The Women Workers' Congress has accepted Esperanto as its official language for the 1923 congress. Classes are held in Lugano, Bellinzona, Locarno, Chiasso and Biasco. The Law Society of Lugano, "La Difesa," an important body, has decided to install an Esperanto library. This should stimulate interest in the canton of Ticino.

The Finns are making great preparations for the congress of 1922, recognising that this gathering may determine the attitude of the League of Nations. Special ships will probably be sent from Hull, Antwerp and Stettin. Twenty-one samideanoj signed up for the congress before the first communication.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni atendas la nagon de multaj suldataj abonoj. Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:— M. Miller, 4/6; N. C. Jensen, 4/6; F. Jondul, 4/6; M. J. See Ho, £1; C. H. Parker, 5/-; P. H. Clarke, 4/6; — MacDonald, 4/6; G. D. Nash, 9/6; J. L. Evans, 1/1; L. Thompson, 4/6; — Ostler, 4/6; — Widdowson, 4/6; — Winter, 4/6; — Burns, 4/6; J. A. Moyle, 10/-; H. Weiss, 6/-; H. N. Loof, 4/6; M. Freely, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor